

# Enhavo

- **anoncoj**

Leteroj de Zamenhof en TTT; UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por *Unesko-Kuriero*; *Scienca Revuo* bezonas vian helpon; Forpasis Doug LEONARD; ESF nomis novan Ĉefdirektoron; Lokaj grupoj stariĝas kaj aktiviĝas!; Korespondi deziras

- **Adiaŭa mesaĝo**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

Okazis en la mondo komunika revolucio, kiu daŭre transformas nian manieron interrilati unu kun la alia. Inter la defioj alfrontendaj estas la decido ĉu ni daŭre havu grandan brian oficejon. Alia afero analizenda estas niaj kongresoj, en vastega lando kie regionaj renkontiĝoj ligitaj per retaj komunikiloj eble povus provizi pli ampleksajn kaj demokratiajn forumojn por diskutado.

- **de la estraro**

Raportoj de la direktoroj kaj aliaj estraranoj.

- **Unuaj laboriloj**

la amatora lignaĵisto - Daĉjo Rutan

Kiujn laborilojn oni bezonas por prilabori lignon? Jen helpo por komencantoj.

- **Diskuto de receptoj**

loke - Fred Meyer, III

Lokaj Esperantaj kluboj aŭ asocioj ofte bezonas regulan agadon, kiu estas kaj amuza kaj instrua. Unu tia agado estas la diskuto de receptoj. Almenaŭ ni en la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso trovas ĝin tiel.

- **ProbleMaro: temoj el la bluaj profundoj**

scienco - Joshua Morris

La maroj montras spurojn de severaj problemoj. Ili pli kaj pli varmiĝas kaj acidiĝas. Fandiĝantaj glacitavoloj minacas ŝanĝi la ekvilibron de saleco kaj temperaturo, kiu pelas marfluojn kaj moderigas klimaton.

- **La murdita edzino**

enigmoj - Daĉjo Rutan

En komforta antaŭurba hejmo, Profesoro Ŝibolet ekzamenis la kadavron de sinjorino Debora deVoj.

- **Murdo en oficejo**

enigmo-solvoj

Solvo de nia pasintnumera enigmo.

- **Stoko de Esperanto-sapujoj**

senintenca esperantaĵo?

Daŭras la aperado de sapujoj kun nomoj Esperantaj...



### Leteroj de Zamenhof en TTT

Okaze de lia 100-a morto-datreveno, ni skanis kaj publikigis 19 originalajn korespondaĵojn de Ludoviko ZAMENHOF. La kolekto *Leteroj de Ludoviko Zamenhof* [<https://goo.gl/wZYpp0>] estas nun libere kaj senpage legebla en la retejo de la Esperantomuzeo kaj de la Kolekto por Planlingvoj.



Laŭpove ni estontece skanos kaj publikigos pluajn malnovajn arkivaĵojn el la Esperantomuzeo en Vieno.

— *Bernhard TUIDER*, bibliotekisto, Aŭstria Nacia Biblioteko

### UEA serĉas tradukistojn kaj provlegantojn por *Unesko-Kuriero*


Post kelkajara paŭzo pro financaj malfacilaĵoj, la fama revuo de Unesko reaperas kadre de interkonsento inter la ĉina registaro kaj la Organizo de UNO pri Edukado, Scienco kaj Kulturo. Ekde nun ĝi eldoniĝos kvarfoje jare en la ĉina, angla kaj franca lingvoj, sed Unesko ankaŭ libere permesas alilingvajn eldonojn, se oni trovas por tio la financajn rimedojn.



Laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, pretiĝas eksperimenta eldono de la Kuriero en Esperanto. Same kiel por la alilingvaj eldonoj, la teknika laboro okazos en Ĉinujo, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboros homoj el diversaj landoj. Nun la ĉefa bezono estas tradukistoj kaj provlegantoj kiuj kapablas redoni la tre diverstemajn, klerajn artikolojn en bona kaj flua lingvaĵo. Se vi regas Esperanton je nivelo C1 aŭ pli alte, se vi ŝatas interesan kaj defian traduklaboron, kaj se vi povas regule disponigi vian tempon por tia kunlaboro, bonvolu skribi rekte al la projekto-kunordiganto, <[trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com)>.

### Scienca Revuo bezonas vian helpon

La Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) serĉas teamon por redakti la gazeton *Scienca Revuo*. Nia prezidanto Orlando RAOLA jam konsentis prizorgi akiradon kaj poluradon de tekstoj, kaj li bezonas iun por doni finan eldonistan rigardon kaj enretigi la tekstojn. Por proponi vin, bv. sendi mesaĝon al <[oraola@gmail.com](mailto:oraola@gmail.com)>.



### Forpasis Doug LEONARD

Mi tristas anonci ke nia kara Doug LEONARD forpasis la 22-an de Majo. Li havis 75 jarojn. Doug estis entuziasma partoprenanto kaj organizanto de *Esperanto Society of Sacramento* (ESOS) dum multaj jaroj, kaj servis ankaŭ kiel kasisto de ESOS kaj Esperanto-USA.

Dum la lastaj kelkaj jaroj, estis malfacile por li partopreni en niaj ESOS-kunvenoj. Tamen li persiste venis, kun sia oksigenujo, per la malavara helpo de sia dediĉita edzino, Anne LUREE.

Doug estis ankaŭ parto de la historio de Esperanto en Usono; li lernis la lingvon de siaj gepatroj, kiuj estis fervoraj esperantistoj kaj gravuloj en la Usona movado. Antaŭ kelkaj semajnoj, la paro invitis min veni transpreni la tutan ESOS-bibliotekon, kiu konsistas el centoj da libroj de pluraj generacioj de esperantistoj en Sakramento kaj aliloke.

Doug estis malforta, sed same amikema kaj kara kiel ĉiam, kaj Anne donacis al mi belajn florplantojn dum ilia ĉarma hundeto saltis ĝoje ĉirkaŭ niaj piedoj. Dek unu skatoloj da libroj venis hejmen en mia kofrujo, kaj kun la beno de Doug kaj Anne mi organizas la librojn kaj provas trovi novajn hejmojn por tiuj, kiujn ni ne povas konservi. Estas honoro por mi transpreni la respondecon de ESOS de lia generacio al la mia. Mi esperas ke nia grupo restos same vigla kaj forta kiel dum lia tempo.

Bonan vojaĝon, Doug. Ni kunsendas niajn

bondezirojn kaj ĝojas por vi, ke vi nun liberas de la limigoj de la homa korpo. Ĝis la revido.

— *Amanda HIGLEY*

## ESF nomis novan Ĉefdirektoron

La fonduso *Esperantic Studies Foundation* (ESF) nomis Charles O. MAYS kiel sian novan Ĉefdirektoron ekde la 1-a de Julio. Lia antaŭulo Joel AMIS eksiĝas por kompletigi siajn magistrajn studojn pri religio, survoje al pastrigo en la Anglikana Eklezio de Kanado.



Laŭprofesie, Chuck estas elektra inĝeniero kaj projektogvidisto. Li diplomiĝis pri elektra inĝenierado ĉe la Nord-Karolina Ŝtata Universitato. En la daŭro de sia kariero, li pasigis longajn periodojn eksterlande, inkluzive unu jaron en Honkongo kaj dek jarojn en Aŭstralio. Lige kun sia profesio, li vaste vojaĝis en Eŭropo kaj Azio kaj ankaŭ vizitis Sud-Amerikon kaj Afrikon.

Chuck jam kelkajn jarojn aktivas en la aferoj de ESF. Interalie, li aranĝis multjaran sidejon por NASK, la Nord-Amerika Somera Kursaro, kiun ESF organizas ĉiujare. Li elektiĝis kiel estrarano de la Fondaĵo en 2013.

## Lokaj grupoj stariĝas kaj aktiviĝas!

Pro la multegaj studentoj en Duolingo.com, Lernu.net, kaj aliaj interretaj lerniloj, unu ĉefa demando estas, “Kun kiu mi parolos Esperanton?” Multaj tiaj studentoj loĝas en urboj aŭ vilaĝoj kaj sentas sin iom izolitaj. Ni en Esperanto-USA klopodas helpi ilin per la membroj, lokaj grupoj, kaj iloj, kiujn ni havas.



Nova loka grupo komenciĝas kiel ideo en la menso de unu persono, kiu volas renkonti aliajn esperantistojn en la sama urbo. Tiu persono iĝas la “kontaktulo” por tiu urbo. Esperanto-USA listigas ties nomon kaj kontaktinformon en la paĝo de lokaj grupoj en nia retejo [<https://goo.gl/8HpfB4>]. Tiel aliaj

interesitoj povas trovi samideanojn en la sama urbo.

La listo nun enhavas cent lokajn grupojn kaj kontaktulojn! En pasintaj jaroj ĝi havis pli ol sepdek, aŭ pli ol okdek lokajn grupojn. Se oni streĉas la difinon de “loka grupo” por inkluzivi kontaktulojn, oni atingas cent.

Se vi rimarkas mankon aŭ neĝustan informon en tiu paĝo, bonvolu informi min. Se vi konas amikon, eble per *Facebook*, *Duolingo*, aŭ *Lernu!*, kiu serĉas lokan grupon, nepre sendu ilin al tiu paĝo.

Ni nun kreskas en Esperanto-USA danke al la amikeco en lokaj grupoj kaj danke al novaj iloj en la mondo de Interreto.

— *Filipo DORCAS*  
<[filipo@grupoj.org](mailto:filipo@grupoj.org)>, *Komisiito por lokaj grupoj*

## Korespondi deziras

Membro Filipo DORCAS sendis al ni la jenan:



Mi ricevis poŝtleteron de Ted COLE en Beaumont, Teksaso. Li serĉas budhisman grupon. S-ro Cole skribis en bela manskribo en perfekta Esperanto. Li serĉas iun por korespondi, kaj petis specife pri budhisma grupo. Li estas malliberulo, kaj ne havas aliron al Interreto.

**Ted Cole #1648258, Stiles Unit, 3060 FM 3514, Beaumont TX 77705**



Ĉi-jare la Moskva Esperanto-Asocio MASI iniciatis projekton *Esperanto-Poŝtkruciĝo*, kaj ili invitas esperantistojn tra la mondo aliĝi.

Ĉu vi volus ricevi belan bildkarton de esperantisto? Ĉu vi volus mem saluti iun en Esperanto? Necesas nur registriĝi en la poŝtkruciĝo-retejo [<http://bildkarto.weebly.com>].

Vi tuj ricevos adreson de jam aliĝinta esperantisto, al kiu vi devos sendi bildkarton kaj skribi sur ĝi

kelkajn frazojn en Esperanto aŭ simple “Saluton el ... (via lando)”. Poste indos raporti pri la sendo en la sociaj interret-grupoj *VKontakte* aŭ *Facebook*. Poste vi kontroladu vian propran poŝtkeston, ĉar ankaŭ vi ricevos bildkarton!

Vi povos trovi amikojn el aliaj landoj kaj poste korespondi kun ili, aŭ simple kolekti belajn poŝtkartojn – ekzemple por montri al ekstera publiko, ke esperantistoj ekzistas ĉie tra la mondo!

## de la estraro

---

Por ĉiu numero de *UE* mi petas la estraranojn iomete verki por sciigi al vi, kion ili lastatempe faris. Ili mem decidas kiel kaj pri kio raporti: ĉu pri agadoj, ĉu proponi aŭ diskuti ideojn, ĉu instigi vin al kunlaboro en diversaj projektoj, ktp.

Kaj ne forgesu, karaj legantoj: ni volas aŭdi ankaŭ *viajn* demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro — ĉu en Esperanto aŭ en la angla. Sendu mesaĝojn por nia *leterkesto* al la redakcia adreso en la kolofono.

— *La redaktoro*

---

## George BAKER, Kasisto

The Budget Comparison 2016 Summary below shows the budget trends over the last eight years. The 2016 deficit of \$34,136 was covered as follows:

- \$7748 investment income from the Unrestricted Funds (1)
- \$5856 reduction in cash-on hand from the General Fund (2)
- \$2532 transfered from other accounts, (UEA, accounts receivable)(2)
- \$18000 capital transfered from the Unrestricted Funds. (1)

Also please refer to the financial reports by the Director of the Central Office:

1. See 2016 Quarterly Statements of Fund Activity

### 2. See 2016 Statement of Financial Position

The past year saw a modest gain in membership and the related factors of donations and catalogue and book sales. However, the deficit persists at a high percentage of the total budget due to fixed costs related to the central office, which have been stable at about half of the total budget.

The use of the organization’s capital is a worrisome trend. Financial sustainability will require a sustained increase in membership and donations. It is estimated that reaching a membership of 1000 in the next several years would provide a stable financial position for future growth.



Ĉi-numere ne sendis raportojn:

- Julie SPICKLER, Vicprezidanto
- Jarlo BILLS, Direktoro
- Charlotte BURTON, Direktoro
- Jessica GRASSO, Direktoro
- Angela HARLOW, Direktoro
- Lucy HARMON, Direktoro
- Chris NELSON, Sekretario
- Andrew ROSENBAUM, Direktoro

# Adiaŭa mesaĝo

Orlando E. RAOLA

**K**araj Asocioj kaj aliaj legantoj: Mi sidas komforte ene de giganta jetaviadilo de *Air Canada* kiu ĉi-momente superflugas la absolute mirindajn nigrajn-verdajn-blankajn montojn de Groenlando. Mi estas survoje al mia hejmo en Kalifornio, post sesmonata foresto okaze de mia sabata jaro. Plejparton el tiu tempo mi okupiĝis pri miaj fakaj studoj en Universitato de Oksfordo en Britujo. (La rezultoj de tiu laboro estos la temo de mia prelego kadre de la Internacia Kongresa Universitato, IKU, en la Universala Kongreso en Seŭlo venont-julie.) La ceteron mi pasigis kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, kie mi laboris precipe pri la Biblioteko Hector Hodler.

Mi multe cerbumis pri la momento, kiam mi devos ektajpi tiujn ĉi adiaŭajn vortojn. Laŭ nia asocia statuto, post sesjara deĵorado en la prezidanta posteno, venas momento transdoni la respondecon al alia membro de la asocio. Ĉar antaŭ tio mi deĵoris aliajn ses jarojn kiel estrarano, mi sekvas la alvokon de komuna prudento kaj saĝo kaj adiaŭas nun ĉiujn gvidajn rolojn ene de Esperanto-USA. De nia venonta jarkunveno kaj daŭre en la antaŭvidebla estonteco mi restos membro sen ajna ofico aŭ posteno, krom tio ke mi pretas resti tiel longe kiel vi konsentos, la reprezentanto de usonaj esperantistoj en la rolo de Komitatano A de UEA. Mi sincere esperas, ke inter la entuziasmoj de la novaj generacioj kiuj aliĝos al la asocio, same kiel inter la multaj longtempaj membroj kiuj ankoraŭ ne spertis la laborojn gvidajn kaj estrarajn, ni sukcesos trovi la fortojn kaj la gvidantojn bezonatajn por la pluvivado kaj pluflorado de Esperanto-USA.

Kompreneble, tiu ĉi okazo ĉiam invitas retrospektivon pri la jaroj pasintaj, pri la ĝojo portita de la brilaj momentoj kaj pri la frustrigoj kaŭzita de la ne plenumitaj promesoj kaj revoj. Ni staras meze de profunda transformiĝo, kiu tuŝas ne nur nian asocion sed ankaŭ ĉiujn Esperantajn asociojn kaj eĉ asociojn ĝenerale. Nur per la ĝusta kompreno de tiu ĉi monda situacio kaj de la novaj

ŝancoj por evoluo kaj kresko, ni povos resti trankvilaj dum ni konstatas la evidentan ŝrumpon de la membraro. Iom pli komplika afero certe estas la financa situacio, ĉar deficitaj bilancoj en pli malpli longa periodo kondukos al nepra malfondiĝo.

Dum la lastaj kvardek jaroj okazis en la mondo komunika revolucio, kies konsekvencojn ankoraŭ ni ne povas ĝisfunde kompreni, interalie, ĉar la revolucio daŭre transformas nian manieron interrilati unu kun la alia kaj kun la ĉirkaŭanta mondo. En nia aparte malgranda angulo aperis aferoj kiel lernu.net, edukado.net, Duolingo, Amikumu... Ju pli multe ili disvastiĝis kaj fariĝis alireblaj por pli kaj pli da homoj, du el la esencaj roloj antaŭe plenumitaj de la Esperanto-asocioj: instruado de la lingvo kaj ebligado de kontaktoj inter la homoj ne plu estas gravaj kialoj por aliĝo. Krome, la sociaj komunikrimedoj (Fejsbuko, Whatsapp, kc.) kaj eĉ la ekzisto de la reto mem, kie iu ajn kun minimuma aliro povas krei kaj diskonigi tutmonde tekston, sondosieron aŭ filmon, kompletigas la novan pejzaĝon kie tutcerte la malnovaj varbaj rimedoj montriĝas nesufiĉaj por reteni kaj kreskigi la bezonatajn nombrojn da asocioj cele al finance vivipova asocio.


Inter la defioj alfrontendaj en relative baldaŭa estonteco troviĝos la decido ĉu ni daŭre havu grandan brian oficejon entenantan sufiĉe grandan librostokon, plejparte libroservon sed ankaŭ iaspecan bibliotekon, kaj laborigantan plentempe direktoron/librovendiston/kasiston... Ankaŭ afero analizenda estas niaj ĉiujaraj kongresoj, en vastega lando kie eble samtempaj regionaj renkontiĝoj ligitaj per taŭgaj retaj komunikiloj povus provizi pli ampleksajn kaj demokratiajn forumojn por diskutado de niaj problemoj kaj organizado de nia kunagado. Kaj la asocian retejon, kaj la asociajn eldonaĵojn, kaj nian rolon en la internacia movado, ĉion ni devos zorgeme analizi kaj derivi el tia analizo saĝajn kaj efikajn proponojn kaj solvojn.

Cetere, la vera celo de tiu ĉi lasta prezidanta kontribuo estas esprimi profundan dankon al ĉiuj

kiuj dediĉis multan tempon kaj energion al nia komuna entrepreno dum la lastaj ses jaroj: Al ĉiuj kiuj daŭre okupis gvidajn poziciojn kiel estraranoj, komisiitoj, klubgvidantoj. Al nia elstara oficeja direktoro, sen kies gravega kontribuo la asocio tute ne povus funkcii laŭ la nuna regmodelo. Al nia bultena redaktoro, kiu sukcesis plueldoni regule kaj altkvalite nian ŝatatan *Usona Esperantisto*, modelon por la bultenoj de landaj asocioj tutmonde laŭ sia duobla karaktero de elektronika kaj papera eldonaĵo. Al la lokaj kluboj kaj eĉ izolitaj aktivuloj, kiuj jaron post jaro invitis la landan kongreson aŭ preparas sin por baldaŭa invito. Al niaj veteranoj kiuj pro sano aŭ pro alta aĝo ne plu sukcesas partopreni je la iama nivelo, sed kiuj daŭre restas engaĝitaj kaj finance kontribuas al nia laboro. Al nia juna aktivularo, ankoraŭ ne tiom nombra kiel ni ĉiuj ŝatus vidi, sed tutcerte la vivanta promeso pri brila estonteco por la ideo Esperanto en nia lando. Al tiuj

kiuj pluportos la torĉon de gvidantoj en la nova estraro elektota en la kongreso en Raleigh, kaj kiuj ricevos mian plenan subtenon kiel aktiva kaj respondeca membro de la asocio. Finfine, al ĉiuj asocioj kaj simpatiantoj kiuj nin subtenas kaj vivigas: denove dankon!

Elkore,  
La Prezidinto



**Orlando E. RAOLA**

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

## Unuaj laboriloj

Daĉjo RUTAN

**J**en ofta demando, kaj eble la plej tikla, de komencantoj en la metio de lignoprilaboro:

“Kiujn laborilojn mi bezonas por prilabori lignon?”

Por ĝenerala lignoprilaboro oni bezonas modestan kolekton de malmultekostaj laboriloj. Ili ne devas esti tutnovaj, sed almenaŭ taŭgaj kaj bonstataj. Tiaj laboriloj estas fojfoje troveblaj brokante ĉe bazaroj, aŭ en reklamoj ĉe retejoj kiel *Craig's List* [<http://craigslist.org>].

### Senelektraj laboriloj

Unue, oni devas havi laborilojn por precize mezuri kaj desegni la diversajn erojn de projekto: **mezurilon** (ekz. faldmezurilon aŭ mezurbendon), **ortilon**, kaj kelkajn **kraĵonojn**.

Gravaj estas iloj por kunfiksi tabulojn per najloj kaj ŝraŭboj: la kutima **ĉarpentista martelo**, kaj ankaŭ baza kompleto de **manaj ŝraŭbiloj** por projektoj kiuj bezonas nur kelkajn mallongajn ŝraŭbojn.

Egale havendaj estas la provizoj: **gluo**, **ŝraŭboj** kaj **najloj** por kunfiksi, **ŝlifpapero** de diversaj gradoj por glatigi, kaj **oleoj** aŭ **farboj** por finpretigo de projektoj.

Ne eblas havi tro da **krapoj**, sed komence oni nur bezonas almenaŭ du. Ne vere gravas la stilo, sed ili devas esti fortaj kaj havi la kapablon malfermiĝi ĝis ses coloj (15 cm). Por ĉiu sekva projekto eble oni volos aĉeti pli da krapoj – estas plej utile akiri ilin duope. Depende de la projektoj,



Faldmezurilo.



Ortilo.



Kompleto de manaj ŝraŭbiloj por fendokapaj kaj krucfendaj ŝraŭboj.



Ŝlifpapero.



tre utila povas esti **bendokrampo**. Por mezgrandaj skatoloj ĝi estas nepra!

Multfoje oni bezonas fari nur unu-du tranĉojn kaj ne volas startigi segmaŝinon por tia malgranda tasko, do mi rekomendas du senelektrajn segilojn. La unua estas mallonga **trapeza segilo**, utila por multspecaj tranĉoj. Ĝi egale facile segas laŭlonge aŭ transverse. La dua havas fajnan dentaron kaj estas ofte uzata por fari oblikvajn, transversajn tranĉojn (aŭ *gerojn*) helpe de speciala kesto. En Esperanto la segilo nomiĝas **gersegilo** aŭ **ferdorsa segilo**, kaj la kesto **gersegujo** aŭ **gersega kesto**.

Oni trovos multan utilon en malgranda kolekto de **ĉiziloj**. Ili estos bezonataj se oni progresos al la farado de morteza aŭ hirundvosta juntado. (Vidu n-ron 2016:6 por priskribo de juntoj.)

Ne forgesu la **laborstablon**! En la komenco oni povas uzi porteblan, faldeblan stablon aŭ lignopanelon sur du segbokoj, sed finfine oni bezonas konstrui apartan stablon.

### Elektraj laboriloj

Man-tenebla, **elektra borilo** estas tre utila por bori truojn kaj turni ŝraŭbojn. Nepre aĉetu borilon kun ŝanĝeblaj rapidoj kiu turnas ambaŭdirekte.

**Saltsegilo** estas utila por komencanto. Ĉefe oni uzas ĝin



Bendokrampo tenanta kadron por pentraĵo.



Mallonga trapeza segilo.



Gersegilo kun gerssegujo.



Ĉiziloj.



Faldebla stablo.



Elektra borilo.

por fari kurbojn, sed kun zorgo oni povas fari pli-malpli rektajn liniojn. Ekzistas multaj specoj de interŝanĝeblaj klingoj kiuj taŭgas por tabuloj de diversaj materialoj kaj dikecoj.

Eble la plej multekosta elektra ilo estas la **surstabla ronda segilo**. Kvankam la ĉefa uzo estas segi tabulojn laŭlonge, malmultekosta segilo povas precize segi Orte kaj oblikve per hejmfaritaj helpiloj, ekzemple orta glitkesto aŭ bevela glitplato. Se oni ne volas unue elspezi monon por tia surstabla segilo, eblas fari samspecajn tranĉojn per ronda segilo kiun oni tenas mane.

Krom se oni vere ĝuas tedan laboron, oni bezonas almenaŭ unu **ŝlifilon**. Se ĝi estas la sola, kiun oni povas aĉeti, mi rekomendas aparaton kiu rotacias tra vagantaj elipsoj. Angle ĝi nomiĝas *random orbital sander*; en Esperanto mi nomas ĝin “vag-rotacia ŝlifilo”. Tamen estas multe da helpo en simplaj ŝlifbloko kaj ŝlifpapero.

## Por eĉ pli serioza lignoprilaboro

Se oni posedas domon aŭ emas esti memfaranto, oni eble jam havas la plejparton el tiuj iloj. Por



Saltsegilo.



Surstabla ronda segilo.



Elektra ŝlifilo.



fariĝi pli serioza en la metio, oni eble volos plibonigi sian ilaron per aĉeto de pli multekostaj aparatoj.

Unu el tiuj estas **bormaŝino** – efektive borilo muntita sur propra stablo – kiu tre utilas por precize fari truojn.

Alia tre utila sed ne nepre necesa ilo estas **bendosegilo**. Kiu helpas pli facile kaj precize fari serpentajn tranĉojn per pli sekura rego de la laborpeco.

Finfine, **kavigilo** rapide faras kanelojn kaj bevelas randojn. Mi uzas por preskaŭ ĉiu projekto, sed ĝi ne estas necesa en la komenco.



Bormaŝino.



Bendsegilo.



Kavigilo.



### Daĉjo RUTAN

Daĉjo estas amatora lignajisto en nord-okcidenta Nov-Jerzejo. Per malmultekostaj iloj li faras malgrandajn projektojn por si, por sia familio kaj, de tempo al tempo, por aliuloj.



# Diskuto de receptoj

Fred MEYER, III

**L**okaj Esperantaj kluboj aŭ asocioj ofte bezonas regulan agadon, kiu estas kaj amuza kaj instrua. Unu tia agado estas la diskuto de receptoj. Almenaŭ ni en la Esperanto-Klubo de Norda Teksaso trovas ĝin tiel.

Neniu povas komplete eviti la diskuton de manĝaĵoj. Se oni sidas kaj diskutas aferojn kun amikoj, finfine la temo moviĝos al manĝado. Manĝado necesas por vivo. Ni ĉiuj bezonas vortprovizon por diskuti manĝaĵojn. Tio ĉi estas aparte grava por denaskaj esperantistoj. Sed estas pli ol tio. Ĉiuj havas favoratajn, plej ŝatatajn manĝaĵojn. Ni ankaŭ pensas pri manĝaĵoj kiel kultura afero. Do dum la diskuto de manĝaĵoj, ni povas paroli pri la kultura disvolviĝo de iu manĝaĵo. Ĉu lasaĵoj estas grekaj? Do manĝaĵoj interesas al multaj.

Estas ankaŭ lingvaj kialoj por diskuti receptojn. Esperanto estas juna lingvo; kaj mankas establitaj nomoj por multaj manĝaĵoj. Ekzemple, mi legis recepton pri kanelonoj, la italaj nudeloj. La recepto estas en la libro *Kiel Kuiru Sen Viando* de Clara DE HESS. Ĝi entenas pli ol mil receptojn. Sed mi ne povis trovi la priskribon de la manĝaĵo en Vikipedio. Mi rigardis vikiajn artikolojn pri kanelonoj en la itala, la angla, kaj la germana. Mi skribis la artikolon kaj kontrolis la vortojn en kelkaj vortaroj. Mi notis, ke *PIV* ne enhavas la vorton *kanelonio*. Ĝi mencias la vorton *kanelono*, sed ne difinas ĝin. Do mi skribis la artikolon uzante ambaŭ nomojn.

Tuj post kiam mi alŝutis la artikolon, mi vidis, ke ĝi ŝanĝiĝis. Estas kataluna esperantisto, kiu ankaŭ estas redaktisto de Vikipedio, kaj li ne ŝatas la vorton *kanelonio*. Li elprenis la vorton de la artikolo. Do la nomo de tiuj italaj nudeloj kaj de la manĝaĵo, farita el tiuj nudeloj, ne estas establita en la Esperanta lingvo. Ni esperantistoj bezonas diskuti manĝaĵojn por establi ties nomojn. La diskuto de receptoj estas amuza maniero por fari tion.

[Noto de la redaktoro: Ial la reta *PIV*

[<http://vortaro.net>] rifuzas montri difinon por

*kanelonoj*, sed efektive ĝi ja troviĝas en la papera


*PIV* 2005:

**kanelon/oj** [Kuirarto kaj gastronomio] Cilindraj pastaĵoj, farĉitaj per viandmuelitaĵo k bakitaj, precipe kun grateninta beŝamelo.

Ŝajne la reta *PIV* ne kapablas montri vortojn, kiuj normale havas j-finaĵon. Ekzemple, mankas ankaŭ *spaget/oj* kaj *eĉ nudel/oj* malgraŭ tio, ke ambaŭ vortojn difinas la papera versio de la vortaro.]

Mi havas tri Esperantajn kuirlibrojn. Unu estas tiu de Hess. Mi havas ankaŭ *Internacie Kuiru* de Maria BECKER-MEISBERGER kaj *La Internacia Kuir-Libro* de Johanna SHORTER-EYCK. Inter tiuj ĉi libroj estas pli ol mil okcent receptoj. Estas aliaj Esperantaj kuirlibroj. Mi trovis liston en la retejo *Vikilibroj* [<http://eo.wikibooks.org>]. Estas ankaŭ komune konstruata *Kuirlibro* tie.

Por la nord-Teksasa grupo, mi kopias la ingrediencojn kaj la preparan procedon de recepto kaj tiam aldonas glosaron de maloftaj vortoj kun la anglaj vortoj, la Esperantaj vortoj, kaj esperantlingvaj difinoj (plej ofte el *ReVo*). Foto de la difinitaj aferoj ofte utilus, sed ne ĉiam estas facile troveblaj. Mi sendas la rezultan dokumenton al la grupo prefere pli ol semajnon antaŭ la kunveno. Ĉe la kunveno ni legas la glosaron kaj la recepton. Kelkaj el ni havas pli ol unu opinionon. Do la diskutoj estas viglaj kaj amuzaj.



## Fred MEYER III

Fred estas emerita teoria fizikisto kiu laboris ĉefe en la duonkonduktaĵa industrio. Li eklernis Esperanton en 1966 kaj uzas ĝin de tiam. Li ĝuas verki en Esperanto kaj traduki Esperanten.

Amikeco inter homoj kaj la disvolviĝo de ties lingvoj kaj kulturoj ankaŭ tre interesas lin.

<f3meyer@texoma.net>

# ProbleMaro: temoj el la bluaj profundoj


Joshua MORRIS

**T**ero estas mara planedo. Maroj kovras preskaŭ du trionojn de la tersurfaco, kaj havas mezuman profundecon de ĉirkaŭ 3.68 kilometroj (2.3 mejloj). Maroj konsistigas la plej grandan loĝeblan parton de la biosfero, kaj verŝajne, la plejparto de la maraj specioj (pli ol 90%) ankoraŭ ne estas priskribitaj.

Malgraŭ ties emo al tero, la homo estas efektive mara specio. La oksigeno en unu el du spiroj venas de la maroj. Maroj donas al ni nutraĵon kaj amuzon. Ili stabiligas klimaton kaj ensorbas grandegan kvanton da karbona dioksido. Niaj fizikaj, ekonomiaj, kaj kulturaj ligoj kun maroj estas profundaj, kaj fakte, niaj destinoj estas la samaj: se la maroj formortos, ankaŭ la homaro formortos.

Alarme, la maroj montras spurojn de severaj problemoj. Ili pli kaj pli varmiĝas kaj acidiĝas. Fandiĝantaj glacitavoloj minacas ŝanĝi la ekvilibron de saleco kaj temperaturo, kiu pelas marfluojn kaj moderigas klimaton. Troa fiŝkaptado, poluado kaj aliaj premoj fare de la homaro minacas malaperigi multajn marspeciojn. Kaj nun, novaj teknologioj de la petrol- kaj gas-industrioj pliiĝas niajn atingojn denove: oni nun celas eltiri mineralojn el la mara fundo. Niaj teknikaj atingoj profundiĝis sen profundiĝo de kompreno pri la ekosistemoj, kiujn ni komencas ekspluati.


Marpoluo estas tutmonda problemo, kaj ĝiajn rezultojn oni sentas eĉ en landoj sen aliro al maro. La aktuala internacia leĝaro pri maroj estas miksaĵo de traktatoj pri ŝipado, mar-poluo, fiŝkaptado, finegocoj pri endanĝerigitaj specioj, ktp. La plej granda kaj ambicia estas la *Konvencio de la Unuiĝintaj Nacioj pri Marjuro*. Per ĝi, UNO kodigis internacian leĝon de la maro, kaj estigis aron de “marzonoj”. Laŭ la traktato, ĉiu marborda lando rajtas estri marrimedojn ene de 200-marmejla distanco de la bordo. Landaj rajtoj malpliiĝas laŭ distanco. (Vidu figuron 1).



Figuro 1: Marzonoj laŭ internacia leĝo. Difinoj troviĝas en glosaro fine de la artikolo.

Eksternacia jurisdikcio en la tiel nomataj “altaj maroj” estas tamen ĥaosa: ne maloftas sklaveco, murdo, kaj aliaj homrajtaj mistraktoj. (Vidu *Urbina 2015* por bonega raportado pri la temo.) La tieaj marrimedo apartenas al tiuj, kiuj ekspluatas ilin plej rapide. La altaj maroj estas vastaj: ili konsistigas 64% de la maroj mem, kaj 45% de la tuta tersurfaco. La aktuala reĝimo por regi ilin estas laŭdinda sed nesufiĉa.

La internacia leĝa maŝinaro estas malrapida, mallerta, kaj ne kunordigita. Por respondi al la hodiaŭa problemaro, ni bezonas instituciojn kiuj kapablas adapti kaj facilmove respondi al novaj scioj. Ni bezonas manieron estigi marajn naturprotektejon kaj aliajn regulojn en la altaj maroj, kaj solvojn por apliko kaj plenumo de reguloj. Mi timas, ke sen klaraj propriet-rajtoj kaj efektivaj sistemoj por protekti marojn, la tragedio de la komunaĵo daŭre ludiĝos en la altaj maroj.



Figuro 2: La altaj maroj, kie mankas leĝoj por protekti marajn ekosistemojn, konsistigas 64% de la maroj, kaj kovras 45% de la tuta tersurfaco.

## Glosaro

### Insularaj Akvoj

Maro inter insuloj de insularo – ekzemple inter la havajaj insuloj.

### Teritoria Maro

Zono kiu etendas suverenajn rajtojn je 12 marmejloj maren. Leĝoj de marbordaj landoj aplikiĝas en Teritoria Maro.

### Kuntuŝiga Zono

Zono, kiun marbordan landon bezonas por efektiviĝi leĝojn ene de sia teritoria maro. Alilandaj ŝipoj, inkluzive de militŝipoj, rajtas tranavigi tiun zonon libere (sed nepre pace).

### Ekonomia Ekskluda Zono (EEZ)

Enhavas la Kuntuŝigan Zonon, kaj etendiĝas de 12 ĝis 200 marmejloj for de marbordaj bazlinioj. En EEZ, marborda lando ne rajtas efektiviĝi siajn leĝojn, sed ĝi havas ekskluzivan rajton profiti de maraj rimedoj, inkluzive de la kontinentbreto aŭ marfundo.

### Altaj Maroj

Ekster EEZ estas la Altaj Maroj, kiuj apartenas al ĉiu kaj neniu. Tie iu ajn rajtas libere navigi, fiŝkapti, ktp., kondiĉe de aliaj interkonsentoj.

### Kontinentbreto kaj Internacia Marfundo

Se la kontinentbreto de lando etendiĝas preter la EEZ, marborda lando rajtas profiti (se konsentas UNO) de mineralaj kaj aliaj rimedoj de la marfundo ene de maksimume 350-marmejla distanco. Ĉiuj aliaj rajtas fiŝkapti, navigi, ktp., sur la supra akvo. Preter 350 marmejloj estas la Internacia Marfundo, kies rimedoj estas “komuna heredaĵo de la homaro” kaj kion regas Estro de la Internacia Marfundo (sidejo en Kingstono, Jamajko).

### Legu pli:

- *Deep Trouble; How to Improve the Health of the Ocean.* [<https://goo.gl/4pjda3>] 27 May 2017. The Economist. 27 May – 2 June, 2017.
- Urbina, Ian. 2015. “The Outlaw Ocean” [<https://goo.gl/r66BjU>]. The New York Times. 25 July 2015.



### Joshua MORRIS

Joŝuo estas sciencisto ĉe ne-registara organizaĵo naturmedia. Li laboras por konservi marbordajn habitatojn en Kalifornio, konsciante pri la neevitebleco de marnivela altiĝo.

<[josxuo@gmail.com](mailto:josxuo@gmail.com)>

# Murdo en oficejo

En N<sup>o</sup> 2017:2 aperis nia tria krim-enigmo. En ĝi profesoro Ŝibolet intervjuas atestanton (Mortimer Ginto), kiu ĵus pafmortigis s-ron Viktor Tim. Laŭ Ginto, Tim estis kolera, kaj pafis unue; Ginto nur repafis por defendi sin. Sed Ŝibolet dubis la ateston, kaj li akuzis Ginton pri murdo. Kial?

Ĉar ene de la atesto li trovis detalon nekonsekvencan. Ginto asertis, ke li tuŝis nenion “krom la telefonon por voki la policon”, kaj ke “en preskaŭ unu fulma movo” Tim malfermis la

tirkeston, elprenis pistolon, kaj pafis.

Sed kiam Ŝibolet alvenis, li trovis la tirkeston *fermita*. Viro tiel kolera kiel Tim certe ne zorgus refermi tirkeston post elpreno de pistolo. Do devas esti Ginto, kiu fermis ĝin.

Gratulon al **Anna BENNETT** kaj **Bob (Robeto) KOEHLER**, kiuj per lotumado gajnis premiojn de la libroservo. Dankon ankaŭ al niaj aliaj solvintoj, Chris MCDOWELL, Jorge Rafael (Rafa) NOGUERAS, kaj Douglas ZANDER.

## enigmoj

---

# La murdita edzino

Daĉjo RUTAN

En komforta antaŭurba hejmo, Profesoro Ŝibolet ĵus ekzamenis la kadavron de sinjorino Debora deVoj. Ĝi kuŝis sur sofo en la salono. “Iu batis sinjorinon deVoj ĉe la malantaŭo de ŝia kapo tri aŭ kvarfoje per la tenilo de tiu ĉi pistolo”, li diris.



La pafilo kuŝis surplanke apud la kadavro. Ŝerifo Nebulet zorge faligis pulvoron sur la armilon por trovi fingrospurojn.

“Mi telefonis al la edzo ĉe lia oficejo, kaj diris nur ke li tuj iru hejmen”, diris la ŝerifo. “Mi ne ŝatas peri malbonan novaĵon. Ĉu vi faros?”

“Jes, mi faros”, respondis Ŝibolet, eksidante sur brakseĝo. Mortenketisto forportis la kadavron el la ĉambro. La ŝerifo alportis seĝon el la kuirejo, kaj ili ambaŭ atendis sinjoron deVoj.

La ambulanco forveturis ĝuste kiam sinjoro deVoj alvenis. Li eniris la salonon kaj demandis, “Kie estas

Debora? Kio okazis?”

“Bedaŭrinde mi devas informi vin”, diris Ŝibolet, ekstarante, “ke iu murdis ŝin antaŭ proksimume tri horoj. Via servistino trovis la kadavron kaj vokis la ŝerifon.”

Ŝerifo Nebulet stariĝis, tenante platan sakon, kaj diris, “Mi ne trovis fingrospurojn sur la pafilo. Mi sendos ĝin al la polic-laboratorio.”

La vizaĝo de sinjoro deVoj ruĝiĝis kaj li kolere diris, “Vi nepre trovu la aĉulon kiu mortklabis Deboran. Kiel rekompencan mi donos dudek-kvin mil dolarojn!”

“Ŝparu vian monon”, diris Ŝibolet. “Ne estos tiel malfacile trovi la murdinton.”

---

Kial Ŝibolet diris tion? Ĉu vi povas diveni? Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn. Bonvolu sendi **nur unu** solvon al la redakcio **antaŭ la 15-a de Aŭgusto**.

---

## ***senintenca esperantaĵo?***

---

# **Stoko de Esperanto-sapujoj**

En pasintaj numeroj ni prezentis tri sapujo-markojn senintence Esperantajn: *SANIS*, *PROVON*, kaj eĉ *GOJO* – kun kvinpinta steleto.



Eble ne surprize, ĵus aperis kvara: *STOKO*.



# *Usona Esperantisto*

**Redaktoro / Editor:** HOSS FIROOZANIA

Sendu kontribuojn al <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ al:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto* estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retpoŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

*Usona Esperantisto* estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo *cc-by-sa* [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>]. Kiel komplezon, ni cetere petas, ke oni atentu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia TTT-paĝaro.



*Usona Esperantisto* (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org>]. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

*Usona Esperantisto* is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike (cc-by-sa) license [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>]. As a courtesy, we ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style manual on our website.